Laŭzana Esperanto-Societo
Septembro 2019 - n-ro 7

# Laŭzana informilo

*Kunsidoj normale okazas ĉiumonate ĉe Espace Dickens, rue Dickens 6, Laŭzano*

## *Venontaj kunsidoj:*

- Lu, la 7-an de oktobro *Decidota*
- Lu, la 4-an de novembro *Decidota*
- Sa, la 14-an de decembro *Zamenhofa Festo*
- Lu, la 6-an de januaro *Decidota*

## Lunde, la 2-an de septembro, je la 20-a

## Francisko parolos al ni pri libro kiu nuntempe polemikas: *SODOMA*

## LA SEKRETA VILAĜETO

Nia filmo surpapere pretas. La esperantaj dialogoj inter la diversaj roluloj atendas siajn heroojn; Romeo ludos Karlo-n, la vojaĝanton kaj David rolos la vilaĝestron.

Jam la jodla koruso estas filmita kaj aperas en jutubo. (Iru rigardi LES ROMANDS de Pully).

Komence de septembro, ni filmos en Montreux kaj en la muzeo de Blonay-Chamby. La morgaŭon ni iros en mian familian ĉaledon "Les Tailles" en Chesières realigi la scenojn ene de la hejmo de *Paŭlo* (David).

Entute, 22 aktoroj konsentis partopreni la filmadon en la *sekreta vilaĝeto* kaj nun serĉas adaptitajn vestaĵojn por eniri perfekte sian rolon ĉar dum la tuta semajnfino de "Le Jeûne Fédéral" ni aliformos la vilaĝon de La Sage al *Universal Studio Holliwood* ... montara dum tri tagoj. Kelkaj neesperantistoj konsentis ludi en nia filmo kiel Grégoire kiu speciale venos el Parizo kaj Jean-Baptiste, el Berno.

La 2-an de septembro, ni iros filmi la parton en Ĝenevo ĉe niaj amikoj de la Stelo, kiuj konsentis partopreni nian filmon kaj ludi siajn proprajn rolojn en la salono de la Kastafesto je la 16-a.

Francisko Randin


## Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com / esperantolausanne
youtube.com / esperantolausanne
dailymotion.com / esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8


**Komitato 2019**

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

**Sabata bazaro en *La Palud***
*(ĉar ni filmos en La Sage)*
~~la 14an de septembro~~
la 12an de oktobro

**Filmado en *La Sage***

Gekaraj,

Vi estas bonvenaj en la *Sekreta Vilaĝeto* kie ni filmos dum la semajnfino inter la 14-a kaj la 16-a de septembro.

Venu kun via pikniko - aŭ sabate, aŭ dimanĉe, aŭ lunde - ĉeesti kaj spekti kiel oni realigas filmon en esperanto dank'al ne profesiaj aktoroj ege laboremaj.

Simple telefonu al: 076 369 29 17

**Babilada Rondo ambaŭgrupe:**

**Vendrede, la 18-an de oktobro**
je la 19-a, Maryse Tissot invitos nin siahejmen en 1800 Vevey, route de Saint-Légier 20a
079 405 71 76

**La babiladaj rondoj ...**

***Okcidente, Oriente kaj Ambaŭgrupe***

... atendas viajn proponojn - inter oktobro kaj januaro - al la redaktoro de nia informilo ĝis la 15-a de la antaŭa monato.

Dankon al vi.

| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 |
|---|---|---|---|---|
| 6 | | | | |
| 7 | | ■ | 8 | |
| 9 | | 10 | | |
| 11 | | | | |

**HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)**
**1.** E/Ŝ (estas ___); **6.** ___ kodo estas komputila kodo la baza latina alfabeto; **7.** Konsonantoj de rato; **8.** Kons......oj de rozo; **9.** Metala kapŝirmilo por soldatoj; **11.** Malmola organo de la vertebruloj (akuzativo).

**VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)**
**1.** Danĝera fiŝo por naĝanta homo; **2.** E/Ŝ (___ ŝerco); **3.** Konsonantoj de roko; **4.** Loko por spektakloj de akrobatoj kaj klaŭnoj; **5.** Verda loko meze en la dezerto (akuzativo); **10.** Konsonantoj de osto.

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Ŝ | E | R | C | O |
| A | S | K | I | A |
| R | T | ■ | R | Z |
| K | A | S | K | O |
| O | S | T | O | N |

## Karlo de Edmond Privat

sepa ĉapitro: ***La sonĝo de Karlo***

Post la interparolado kun sia patro pri la formo de l' tero, Karlo pripensis ankoraŭ tre ofte dum la tago. Strangan sonĝon li havis la sekvintan nokton. Li sonĝis, ke S-ro de Lavel, la riĉa amiko de lia patro, lin invitis por kunvojaĝado en sia aeroplano.

Ili aĉetis grandan keston da biskvitoj kaj metinte ĝin sur la aeroplanon, ili sidiĝis kaj ekflugis for. Ili devis transiri altajn montojn. La aeroplano flugadis tre rapide kaj trapasis grizajn nubojn. Estis malseke kaj malvarme. Karlo sin premis kontraŭ sia gvidanto, dum ili pasis super akraj montpintoj kaj teruraj rokoj.

S-ro de Lavel montris al Karlo, kiel la ebenaĵo subite finiĝas en la malproksimo. Tie estas la ekstremaĵo de la mondo, kiun li tiel deziris vidi. La aeroplano baldaŭ alteriĝis. Marŝinte kelkajn paŝojn, Karlo sin trovis ĉe la limo de la mondo. Estis granda kajo kun fera barilo inter limŝtonoj. Tenante la manon de S-ro de Lavel, Karlo kliniĝis por rigardi malsupren: nenio, nur bluo . . . senfine.

Ambaŭ manĝis kelkajn biskvitojn tute malmoligitajn de la malvarmo. "Nu," diris S-ro de Lavel post momento, "ni nun veturos malsupren sur nia flugmaŝino, ĉu ne?" Karlo ektimis iom sed nenion diris. Ili forflugis. La aeroplano transpasis super la barilo kaj flugadis tute rekte for de l' tero.

Post kelkaj minutoj, kiam ili estis jam tre malproksimaj de la tero, S-ro de Lavel ŝanĝis la direkton de la maŝino. Ĝi komencis oblikvan flugadon malsupren. Ili reproksimiĝis al la tero, kaj tiam ĝian subaĵon ili vidis.

Pli kaj pli mallumiĝis, dum la aeroplano rapidege flugadis kurbe por restadi proksime de l' tero. Stranga afero: la ĉielo estis malsupre kaj flanke, sed supre kaj ĉe la alia flanko estis la bruna tero.

La aeroplano estis malsuprenirinta tre rapide kaj povis nun flugadi preskaŭ horizontale. Ili ekvidis strangajn arbojn kun longa torda trunko rampanta. Baldaŭ domojn ili ekvidis, verajn domojn pendantajn sub la tero. Ili estis tre multaj kaj ŝajnis esti lignaj dometoj diverskolore pentritaj. Ĉiam pli kaj pli ili alproksimiĝis. Karlo rimarkis, ke la dometoj havas pintan tegmenton kaj ŝajnas pendi je la tero per granda fera ringo ligita al la trunkoj kaj branĉegoj de la rampantaj arboj.

Inter la domoj estis pontoj, sur kiuj aperis multaj homoj ŝajne blanke vestitaj.

Klininte sin por pli bone vidi, Karlo perdis sian ekvilibron kaj falis en la abismon . . .

Li sentis la malvarman aeron siblantan je liaj oreloj, dum li senfine faladis en la profundegaĵo.

- "Nu, karuleto, estas malfrue, vi devas ellitiĝi!"

Lia patrino lin vekis. Karlo frotis siajn okulojn: "Patrineto," li diris oscedante, "mi vidis homojn sub la alia flanko de l' mondo."

(Fare de Francisko)

## Intervjuo de David Buhlmann, Honora Prezidanto de LES



*- Dankon konsenti respondi al miaj demandoj. Prezentu vin kelkfraze.*

**Mi naskiĝis la 12-an de januaro 1933. Mi laboris kiel juvelisto kaj poste mi studis por iĝi muldisto / ceramikisto. De multaj jaroj mi vivas en Laûzano, ekde 1972 membras en la Laŭzana Societo.**

*- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**En 1963, Claude Gacond, kiun mi renkontis dum la *Internacia Civila Servo,* parolis al mi pri la internacia lingvo.**

*- Kiam vi decidis studi esperanton?*

**Estis nur tri jarojn poste, kiam mi loĝis en Langenthal, ke mi decidis studi esperanton pere de la *Perkoresponda Junulkurso de SAT - Amikaro.***

*- Kion pensas via familio kaj viaj amikoj sciante ke vi decidis studi esperanton?*

**Ĉirkaŭ mi, mi neniam renkontis personojn kiuj kritikis mian decidon ... male.**

*- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn kiuj estas esperantistoj?*

**En 1976, kiam mi decidis instrui esperanton en Laŭzano, mia patrino komencis studi kun la aliaj gelernantoj.**

*- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**Oh, jes. Estis la UK en 1959; mi kongresis en Varsovio / Pollando.**



**LUCIENNE DOVAT**

Feliĉan 100-an naskiĝdaton al nia **Honora Membro**